

Ludwig Uhland,
La kapelo

*tradukita de Ludwig Lazarus
Zamenhof*

Supre staras sur la monto
La silenta kapeleto,
En la valo, ĉe la fonto
Ĝoje kantas paŝtisteto.

Sonorado, mortkantado
Nun eksonas tra l' silento, -
Haltas knabo en kantado
Kaj aŭskultas kun atento.

En la tombojn de l' monteto
El la valo ĉiu venos.
Ankaŭ vin, ho paŝtisteto,
Oni iam tien prenos.

*Traduko de la Germana poemo
"Die Kapelle" de LUDWIG UH-
LAND (*1787.04.26 - †1862-13-
11) en Esperanton de LUDWIG
LAZARUS ZAMENHOF (Ludovi-
ko Lazaro Zamenhofo, *1859-
12-15 - †1917-04-14).*

Arg-639-1288 (2012-11-02
16:27:28)

*Tiu ĉi poem-traduko troviĝas
ankaŭ en [www.literaturo.
dk/kapelo.htm](http://www.literaturo.dk/kapelo.htm), ene de la listo
[http://www.literaturo.
dk/enhavo.htm](http://www.literaturo.dk/enhavo.htm).*

Ludwig Uhland,
Die Kapelle

Droben stehet die Kapelle,
Schauet still ins Tal hinab.
Drunten singt bei Wies' und Quelle
Froh und hell der Hirtenknab'.

Traurig tönt des Glocklein nider,
Schauerlich der Leichenchor;
Stille sind die frohen Lieder,
Und der Knabe lauscht empor.

Droben bringt man sie zu Grabe,
Die sich freuten in dem Tal:
Hirtenknabe, Hirtenknabe!
Dir auch singt man dort einmal.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo
estas LUDWIG UHLAND (*1787.04.26 -
†1862-13-11).*

Arg-639-1286 (2012-11-02 16:53:38)

Vidu:[http://meister.igl.
uni-freiburg.de/gedichte/uhl_
103.html](http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl_103.html). *Pri la poeto vidu la vikipe-
diejon [http://de.wikipedia.org/
wiki/Ludwig_Uhland](http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland). La poemo estas
kantebla laŭ melodio verkita de Conra-
din Kreutzer. La melodio estas aŭdebla
tie: [http://www.musicanet.org/
robokopp/Lieder/drobenst.html](http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/drobenst.html).*

Ludwig Uhland,
La kapelo

*tradukita de Manfred
Retzlaff*

Supre staras la kapelo
Sur la pinto de la mont',
La paŝtist' en suna helo
Ĝoje kantas ĉe la font'.

Triste la sonorileto
De funebro sonas de
La altaĵ' tra la kvieto,
La paŝtist' jam kantas ne.

Ĝin ne povas aŭdi soni
La gajuloj post viv-fin'.
Ho, paŝtisto, iam oni
Portos supren ankaŭ vin.

*Traduko de la Germana poe-
mo "Die Kapelle" de LUDWIG
UHLAND (*1787.04.26 -
†1862-13-11) en Esperanton
de MANFRED RETZLAFF
(*1938-11-04).*

Arg-639-1287 (2012-11-02
08:49:45)

*Pri la aŭtoro vidu an-
kaŭ la vikipedian retejon
[http://en.wikipedia.
org/wiki/Ludwig_Uhland](http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland).*